tiston kun malforta ĉevalo, devos grimpi al la supro de dudek-metra masto aŭ formi feron el tero, falos en cilindron de petrolo, devos tiri kvar taksiistojn el haveno aŭ ŝteli la dekstran boton de la prezidento aŭ konversacii kun floro-forma kesto, sentos la emon rifuzi la sesan teleron da terpom-supo, klopodos direkti fulmon al forno, embarasiĝos pro albanaj kindarkoj, volos peti *unu* objekton en Ulan Bator aŭ *sep* en Tokio, estos petita prepari marmeladan toaston, ĉasos stegosaŭron aŭ trovos vin en iu ajn simila ĉiutaga situacio, vi scipovos ne nur flue, sed eĉ elegante esprimi vin en Esperanto!

Sed nun la risorto plene streĉiĝis, nur unu lastan turnon. La alarmo estas bone mendita, la horo proksimiĝas, apenaŭ vi havos tempon legi la subskribon, urbonomon kaj daton (malrapidaj legantoj prefere ellasu la lastan) kaj ekrigardi la apudan paĝon (malrapidaj ekrigardantoj prefere ellasu la legadon entute), ĉar post kelkaj sekundoj jam eksonoros la nova vek-horloĝo!

Stefan MacGill
Budapeŝto, majo 1988.



# LA LAŬTA VEKHORLOĜO

## Ĉapitro unu: Vendisto ĉe la pordo

Vendisto paŝis al pordo. Li frapis. Viro venis al la pordo kaj malfermis ĝin.

"Bonan tagon!" komencis la vendisto: "Mi estas vendisto! Mi v..."

"Ne hodiaŭ, mi dankas vin!" respondis la viro, kaj fermis la pordon.

La vendisto frapis denove kaj la viro denove malfermis la pordon.



Post unu sekundo, jen la vendisto kun unu piedo en la pordotruo. Li komencis:

"Mi estas vendisto, kaj mi vendas horloĝojn!"

"Ne hodiaŭ, mi dankas vin. Mi jam havas horloĝon." respondis la viro kaj denove fermis la pordon.

"**Aŭŭŭ!**" kriis la vendisto: "**Mia piedo!**"

Sed la vendisto estas persista kaj li frapis denove. Denove, la viro malfermis la pordon. Post unu sekundo, jen la vendisto kun du piedoj en la pordotruo. Li diris:

"Sed ĉu vi havas horloĝon, kiu vekas vin en la mateno? Mi vendas vekhorloĝojn!"

"Mi ne havas vekhorloĝon, ĉar ili estas tro mallaŭtaj. Ili ne vekas min. Do, ne hodiaŭ, mi dankas vin!" diris la viro kaj fermis la pordon.

**"Aŭŭŭ!!!"** kriis la vendisto: **"Miaj piedoj!!"**

Sed la vendisto estis ankoraŭ persista kaj li frapis denove. La viro malfermis la pordon. Post unu sekundo, jen la vendisto, kiu staris je sekura distanco for de la pordo! *

La vendisto diris: "Mi havas por vi belan donacon!"

La viro ne fermis la pordon. La vendisto diris:

"Mi donacos al vi unu vekhorloĝon. Ĝi estas tre laŭta vekhorloĝo. Aŭskultu!" **Trrrrrrrrr!** "Nun, permesu, ke mi prezentu min. Mia nomo estas Zofert, jen mia nom-karto." La viro prenis ĝin, sed ne rigardis ĝin. Li prenis karton el la propra poŝo kaj donis ĝin al la vendisto.

"Mi nomiĝas Profesoro Undedorm. Jen mia karto."

"Ho, Profesoro, intelektulo! Bone! Universitata profesoro, kun multaj diplomoj." Li legas la karton:

*Prof. Undedorm, B.Sc. M.Sc, Ph.D. kun H.N.R.*

Ekzistencialismaj teorioj ellaboritaj dum vi atendas

Samtempe la profesoro rigardis la karton de la vendisto kaj komentis: "Ho, ekonomo, interezulo! Malbone!" Li rimarkis, ke ankaŭ la vendisto havas multajn diplomojn, almenaŭ, li havas multajn literojn post sia nomo. Li legis:

*Ru Zofert, M.N.K.L.R.A.D.R*

Avinoj vendataj je avantaĝaj prezoj.

* Eĉ vendistoj ne havas tri piedojn!



"Ha, mono-adoro kaj oferto ruza. Kio en via oferto estas ruza?"

"Mi revenos morgaŭ. Se la vekhorloĝo vekos vin en la mateno, vi aĉetu ĝin. Se ĝi ne vekos vin, ne aĉetu ĝin, ĝi estos donaco por vi!"


"Tio estas interesa propono," diris la profesoro: "donu al mi la vekhorloĝon kaj revenu morgaŭ."

La vendisto estis feliĉa. Li sukcesis. Li donis la vekhorloĝon al la profesoro kaj diris: "Ĝis morgaŭ."

## Ĉapitro du: Mateno

Estas mateno, kaj la profesoro dormas. La vekhorloĝo staras sur la tablo apud la lito. La tablo estas apud la fenestro. Apud la fenestro dormas koko. La horloĝo sonoras! Trrrr! Tamen, ĝi ne vekas la profesoron. La profesoro ankoraŭ dormas. Sed la koko nun ne dormas. La vekhorloĝo vekas la kokon, kiu flugas al barilo kaj krias:

**"Kukelekuuuu!"** *




Sed ankaŭ tio ne vekas la profesoron.

Apud la barilo dormas hundo. La koko vekas la hundon. La hundo bojas. Eĉ tio ne vekas la profesoron! Li ankoraŭ dormas. Sed la hundo vekas katon, kiu dormas sur branĉo de arbo, kiu staras apud la barilo. La kato vidas la hundon kaj timas. Ĝi falas

* Nederlandaj kokoj krias: "Kukeluku", francaj krias "Kokoriko", germanaj kaj italaj "Kikiriki", hungaraj "Kukuriku" kaj britaj "Kokadudildu". Ĉi tiu koko loĝas en Nederlando.